

Ni aŭskultu Denis de Rougemont, 2-a parto
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 761, 1978.05.11 & 13

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Pasintsemajne ni ek prezentis al vi la libron *L'Avenir est notre affaire* (Estonteco estas nia afero) de la svisa kaj eŭropa verkisto **Denis de Rougemont**.

A.- Hodiaŭ ni traduke citos erojn el la unua ĉapitro, kiun Denis de Rougemont titolis **Kresko-religio**. Li pravigas tiun ĉi titolon per tiuj ĉu vortoj :

Cl.- « Pruvon, ke la Kresko fariĝis vera religio de la nuna mondo ... ni havas en la reagoj neordinare perfortemaj, strange malinteligentaj, kiujn naskis same maldekstre kiel dekstre la publikigo de libro, kies titolo senhezite estis blasfema : Limoj al Kresko » (p. 51.)

A.- **Limits to Growth** estas la originala titolo en la angla de verko redaktita de profesoro **Dennis Meadows** kaj de ties kunlaborantaro je la peto de Roma Klubo. La franca eldono aperis ĉe Fayard sub la titolo **Halte à la croissance ?** kun demanda punkto.

Cl.- Pri la neracia, kvazaŭ religia kontraŭ-argumentado al tiu ĉi libro **Limoj al Kresko, Denis de Rougemont** notas tion ĉi : « En tiuj koleregaj refutoj estas la kolerego, kiu interesas min, kaj la klerikala indigno, kiu subite balbutigas insultplene brilegajn inteligentojn : jen atesto, ke la Sankto ĵus leziĝis ! » (p. 52.)

A.- Komence de la ĉapitro la aŭtoro demonstros, al kiaj monstraĵoj kondukas la kresko-religio, kiu kredas, ke la homaro senĉese kreskos : « La loĝantara eksplodo ... utilas kiel ĉefargumento al la aprobantoj de la nepre necesa kresko. » (p. 15.)

Cl.- Pri la loĝantara kresko eksploda, kiu karakterizas la nunan homaron, **Denis de Rougemont** skribas: «Tiu ĉi kresko – kies nuna diagram-kurbo prezentas ege maltrankviligan analogecon kun tiu de kancera disvolviĝo – tiu ĉi kresko mortigus la Teron, longe antaŭ ol ĝi estus ĝin kovrinta per homa karno viva aŭ morta, per radioaktivaj rubaĵoj kaj per betono. (p. 17.)

A.- La urbiĝado de la homaro estas ne nur konsekvenco de la loĝantara eksplodo, ĝi estas ankaŭ ĝia plastika traduko. Kiam duobligas loĝantaro, anstataŭ duobligi la nombron de farmdomoj oni unue duobligas, kaj poste dekobligos la nombron de la etaĝoj en la urboj. (p. 20.)

Cl.- Ju pli grandiĝas urbo, des pli malgrandiĝas la avantaĝoj de la kresko, kaj baldaŭ ili fariĝas negativaj. ... Urbo preteririnta tricentmil loĝantojn malgraŭ buĝeto almenaŭ dudekobliginta ... proponas nenion pli kaj baldaŭ multon malpli, ol urbo kun centmil loĝantoj en Svislando aŭ Nederlando, tio kulturvidpunkte (universitate, koncerte, konference, teatre) kaj vidpunkte al publikservoj. » (p. 25.)

A.- **Denis de Rougemont** ankoraŭ konstatas, ke la urbega socio estas malamika. « Moderna urbego fariĝas detruilo de la politika kunlaboro inter la civitanoj. Tiu ĉi maŝino ŝaltiĝas, tuj kiam superpaŝiĝas kelkaj dimensioj spacaj kaj loĝantaraj. ... Urbego, kiun Tekniko ebligas laŭvorte senfine kreskigi, trans ĉiuj deziroj de la nunaj aŭ estontaj loĝantoj ... estas travivata kiel ĝisfunde malamika. ... Ĝiaj civitanoj povas nenion plu fari koncerne ĝian evoluon, ili do

ŝuldas al ĝi nenion plu, emas doni al ĝi kiel eble malpli [da impostoj] sed tamen atendas ĉujn eblajn avantaĝojn, kiujn ili asertas rajtoj [...] Ĉio fariĝis falsa en la civitanaj rilatoj. » (p. 27)

Cl.- Multajn paĝojn dediĉas la aŭtoro de **Estonteco estas nia afero** al pli kaj pli videblaj konsekvencoj de la urbiĝado, kiu kripligas ĉion, eĉ la kamparon kaj la Naturon fizikan kaj homan. Tiuj konsekvencoj estas la poluo kaj la elĉerpiĝo de la nerenovigeblaj vivrimedoj. Por Denis de Rougemont ritmoŝanĝo estas necesa. Ni citu lin : « *Ritmoŝanĝo*, jen la nura solvo samtempe racia kaj ebla. Sed la ekonomiistoj, partizanoj de la Kresko kaj la funkciuloj de la industriaj societegoj ne volas aŭdi tion ĉi. » (p. 31.)

A.- Hodiaŭ la industriaj societegoj, kies ĉefa celo estas la kresko, alianciĝis kun la naci-ŝtatoj, kies nura celo estas « la propra prestiĝo. Kanalo, baraĵo aŭeto de aŭtoŝoseoj, raketoj, milita frapkapablo – jen la hodiaŭaj ekvivalentoj de la Piramidoj, de la Ĉina Murego aŭ de la Versajla Palaco. » (p. 33.)

Cl.- Limige al la konstrufebro de la homoj, la « nura ordono venas de la Naturo, ne de la tekniko ; ĝi venas de la vivkondiĉoj, ne de ekonomio ; de la homa Deziro, ne de ies profito. (p.36.)

A.- La kontraŭpolua lukto kondukas al rediskuto [...] de la veraj celadoj al tio, kion oni nomas konsum-socio. » (p. 36.)

Cl.- La aŭtoro de **Estonteco estas nia afero** diras : « Kiam mi pretendas, ke la estonteco estas nia afero, tio aparte signifas, ke ni devas adapti la teknikon al niaj celadoj, ne la inverson. (p. 40.) [...] Sin klini antaŭ la Tekniko, antaŭ ties ordonoj, ĉiam signifas forfuĝi de la propra libero kaj sin voli neresponsa. (p. 41.) Teknologio [...] fariĝus efika nur en mondo, kie ĝi ĉesus esti ordonpova : en mondo, kiu donus al si aliajn celadojn ol la kreskon kaj kiu nombrus konsekvence nur la realajn ordonojn, kiuj estas laŭ materia ordo, la limoj de la Tero kaj de ties nerenovigeblaj vivrimedoj, kaj laŭ la morala kaj spirita ordo, la respekto al la persono ĉe aliuloj same kiel ĉe si mem. » (p. 39.)

A.- La venontan semajnon ni daŭrige prezentos al vi la libron **Estonteco estas nia afero** (L'Avenir est notre affaire) de **Denis de Rougemont**.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!